

Leterujo, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 480, 1972.12.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ du semajnoj ni malfermis nian leterujon por respondi al la afablaj salutoj de niaj skribemaj geaŭdantoj. Ni tiam menciis, ke alvenis poŝtaĵoj el 28 landoj kaj 5 kontinentoj. Ni jam salutis niajn geaŭdantojn en Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando kaj Francio. Hodiaŭ ni babilados kun niaj germanaj geaŭdantoj, kiuj sendis multajn interesajn leterojn.

A.- Ni unue salutas plurajn geaŭdantojn : sinjoron Gerhard Bachstein en Osnabrück, sinjoron Günter Bartz en Dortmund-Hörde, sinjoron Helmut Ruf en Königsbrunn, sinjoron F. Poppeck en Oberkirch, kiu skribis germane. Lia letero altiris la atenton de nia direktoro sinjoro Joël Curchod, kiu sendis personan respondon.

Cl.- Sinjorino Petra Engel en Hamburg skribis : « *Multe interesas min la rerigardo al la Svisa Esperanto-Movado antaŭ la du mondmilitoj. Bedaŭrinde mi povas pro lernejaj kaŭzoj nur aŭskulti vian merkredan elsendon. Sed, se vi ĵaŭde elsendus je la 21.45 h anstataŭ je 22.45, la tuta Hamburga Esperanto-Societo povus komune aŭskulti al vi.* » Ni raportos pri tiu deziro al nia direktoro. Ni konsilas al la grupoj peti anon registri niajn elsendojn, kaj poste, kiam niaj prelegserioj havas intereson, reaŭdigi ilin.

A.- Tion faras sinjoro Norbert Merkens en Wuppertal-Barmen. Li sciigas nin, ke li surbendigos la prelegaron de doktoro Arthur Baur pri la romanĉa lingvo. Li poste reaŭdigis ĝin en la kadro de esperanto-kunsido, kie oni poste parolis pri la lingvaj parencecoj inter la latinidaj lingvoj.

Cl.- Dum ni parolas pri societoj, ni salutas la Esperanto-Grupon en Oberkirch, kiu sendis foton de esperanto-strato, kiun ni transsendis al la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds por la esperanto-arkivejo.

A.- Sinjoro Hans Breitenbach en Berlin tre atente aŭskultas la esperanto-programojn de diversaj radio-elsendejoj. Poste li donas siajn impresojn en rubriko titolita *Monitora Taglibro*, kiun aperigas *Germana Esperanto-Revuo*. En ĝi li plurfoje raportis pri nia Svisa Radio, tio interalie okaze de la festado de nia jubileo *Esperanto-elsendado dum 25 jaroj*. Li ankaŭ detale raportis pri la tipe svisa temo *Svisaj virinoj rajtas baloti*.

Cl.- Alia germano plenumas similan laboron. Li nomiĝas Ludwig Pickel. Ĉiusemajne en sia informilo *Pilo-Press* li raportas pri la radio-elsendaĵoj, kiujn li aŭskultis, pri ilia enhavo kaj aŭdkvalito. En la informilo *Pilo-Press* 1972 Numero 14-a, li dediĉas krome du paĝojn al la konstruo de konvertilo, kiu povas faciligi la kaptadon de la kurtondoj. Desegnaĵoj montras, ke tiu konvertilo por kurtondoj permesas uzi la long-ondan butonon por serĉadi la kurt-ondojn. Oni translokigas unu frekvenc-bendon el la kurtonda areo en la long-ondan areon. Jen ni legas al vi kelkajn klarigojn :

A.- « *La plej multaj Esperanto elsendoj estas kapteblaj nur sur kurtondoj. Sed kurtondo estas kaprica fraŭlino. Ĝi dependas de atmosferaj cirkonstancoj, de la sezono, de la tagotempo, de la aktiveco de la sun-makuloj, ktp.*

Cl.- Por egaligi tiujn ondajn kapricojn ekzistas teknika rimedo, helpilo, nome **konvertilo**. Ĝi estas aparato, kiu povas esti konektita per unu ŝirmita kablo kun la ŝtopilingoj « tero » kaj « anteno » de la radiofono, per alia kablo ŝirmita kun la ĉambra anteno aŭ la antena ŝtopilingo de la loĝejo.

A.- La konvertilo translokigas la senditan 9-kilohercaj-frekvencebendon el la kurtonda areo en la long-ondan areon. Pro tio la relativa distanco inter du najbaraj ondoj larĝiĝas. Konsekvence oni trovas la deziritan ondon pli facile sur la skalo. Tie la stacioj ne plu distancas nur duonon da milimetro unu de la alia, sed unu centimetron aŭ pli, same kiel longondaj stacioj.

Cl.- Por lerta radio-amatoro estas simpla afero mem konstrui tian konvertilon. Sed oni povas konstruigi ĝin ĉe kompetenta fakulo kontraŭ modesta prezo. »

A.- Sinjoro Ludwig Pickel poste donas klarigojn pri la kurtondoj mem. Tiuj klarigoj ne plu estas necesaj, por komprenigi la avantaĝon de la proponita konvertilo. Ni opinias, ke la esperantistoj, kiuj estas kondamnataj lukti kontraŭ la ŝanĝemaj kurtondoj helpe de radiofonoj ne adaptitaj al tiu luktado, havus grandan avantaĝon profiti pri la konsiloj de sinjoro Ludwig Pickel.

Cl.- Ni petos al li la permeson aperigi tiujn klarigojn kun la necesaj desegnaĵoj en nian venontan multobligitan cirkuleron, kiun ni dissendas al niaj skribemaj geaŭdantoj. Se vi deziras tiun informilon, tiam nepre skribu al Svisa Radio, Kurtonda Servo, Esperanto-programo, Bern, Svislando.

A.- Aŭ vi povas rekte peti la koncernan dokumenton al sinjoro Ludwig Pickel mem. Jen lia adreso : Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg, Poŝtfako 2113, Okcidenta Germanio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!